

177
STIFRO

El la enhavo:

82 - a UK en Adelajdo

Slovakia E - organizo

Homonimoj 12

Vojaĝo Anglujon

Kecenzoj

Lančov - jubileo

Ne devi

Nia ekonomio



ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO

82-a UK en Adelajdo - ĉeĥaj kongresanoj



☆ Starto ☆

organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio
aperas 6-foje jare. Abono 16 gld.

Komercaj anoncoj: 25 Kč por unu linio, 800 Kč por kvaronpaĝo, 1500 Kč por duonpaĝo, 2500 Kč por tuta paĝo. Duobla reklamo 15% rabato, triobla reklamo 30% rabato.

Membrokotoj: A 160 Kč, B 80 Kč, (C nuligita), D 40 Kč, E 40 Kč, F 3200 Kč, G 100 Kč (Starto), N 20 Kč, eksterlandanoj 20 ECU, enskribo 20 Kč.

Korespondaj kursoj: 335 Kč komencantoj, 240 Kč progresintoj. Aliĝoj: Blanka Gruntová, Vítězná 95, 784 01 Červenka-Litovel

Libroservo: Zdeněk Pluhař, Lamačova 658/6, 152 00 Praha, tel. 02/5817732

Sekcioj de ĈEA: infana, junulara, skolta, pedagogia, katolika, kristana, blindula, medicina, scienc-teknika, fervojista, ŝakista, SAT-amikara, de esperantaj-kolektantoj

Komisionoj de ĈEA: gazetara-informa, ekzamena

Asocia adreso: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, poŝtkesto 1069, 111 21 Praha 1, Ĉeĥio

ĪCO de ĈEA: 00 44 30 34

Banko-konto de ĈEA: 3330-021/0100, Komerční banka, Praha 2

Komitato de ĈEA:

Prezidanto: Vlastimil Kočvara, Ant. Sovy 10, 747 05 Opava

Vicprezidanto: Petr Chrdle, Anglická 878, 252 29 Dobřichovice, tel. 02.9912201, fakso 02.9912126

Vicprezidanto: Věra Podhradská, Poříčí I, 603 00 Brno, tel. 05/4323 3047

Sekretario: Květa Hubnová, Esperanto, p.s. 1069, 111 21 Praha 1

Komitatano: Blanka Gruntová, Vítězná 95, 784 01 Červenka-Litovel

Komitatano: Vladislav Hasala, A. Dvořáka 1, 696 62 Strážnice, distr. Hodonín, tel. 0631/332 278, fakso 0631/332 507

Komitatano: Zdeněk Heiser, Na Nábřeží 45/25, 736 01 Havířov, tel. 069/6815253

Kontrolgrupo de ĈEA: Jana Holcová, Sportovní 2723, 276 01 Mělník (membroj:

Josef Hron, Libuše Krejčí)

Kontisto: Jiří Patera, U Ryšánky 1534, 147 00 Praha, tel: 02.460162

Ĉefdelegito de UEA: Stanislava Chrdlová, Anglická 878, 252 29 Dobřichovice, tel. 02.9912201, fakso 02.9912126

Redaktoro de Starto: Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno, tel. 05/4724 0690

Variabilní symboly pro platby Českému esperantskému svazu

- 311 expedice, úhrada kouponých knih a materiálu
- 604.2 písemné kurzy
- 604.3 předplatné Starto
- 604.5 předplatné Internacia Fervojisto
- 668 dary svazu
- 668.1 dividendy
- 694 členské příspěvky ĈES
- 694.1 členské příspěvky UEA
- 789.1 sekce mládeže
- 789.10 sekce šachistů
- 789.11 sekce sběratelů
- 789.15 ediční fond, Ringo
- 789.16 subkonta klubů mimo výše uvedených
- 789.3 sekce železničářů
- 789.30 Klub Praha
- 789.31 Klub Píero
- 789.32 Klub Poděbrady
- 789.33 Klub Ostrava-Vitkovice
- 789.7 sekce pedagogů
- 789.71 členské příspěvky ILEI (jsou zároveň předplatným pro Internacia Pedagogia Revuo)

Variabilní symbol uvádějte na přední straně poštovní poukázky, zároveň na zadní stranu do „Zprávy pro příjemce“ napište účel platby. Upozornění pro majitele účtů u jiných bank! Pokud platíte z účtu u jiné banky, uvádějte nejdříve svoje jméno a bydliště, např. NOVÁK PŘÍBRAM nebo PROCHÁZKA OLOMOUC apod. Zároveň uveďte i variabilní symbol. Dojde-li platba s označením „ČESKÝ ESPERANTSKÝ SVAZ“, pak vůbec nevíme kdo a proč platí. Takové úhrady účtujeme jako dary svazu.



82-a UK en Adelajdo



La 82-an Universalan kongreson en Adelaide partoprenis nur 5 membroj de ĈEA (ĉiuj flugis kun la karavano organizita de KAVA-PECH), tamen dum la inaŭguro parolis du reprezentantoj el nia respubliko. Krom la ĉefdelegitino de UEA por Ĉeĥio Stanislava Chrdlová, kiu alparolis la kongresanojn nome de ĉeĥaj esperantistoj, havis tre interesan kontribuon pri Esperanto kaj en Esperanto (!) la ĉeĥa ambasadoro en Aŭstralio Jaroslav Suchánek, kiu pro la kongreso alflugis al Adelaido el ĉefurbo de Aŭstralio Canberra kaj restis en nia samsideana komunumo de la interkona vespero sabate vespere ĝis malfrua vespero dimanĉa. Lian interesan intervenon al la kongreso ni publikigas aliloke. Li ne nur parolis interese pri Esperanto kun estraranoj de UEA, sed ankaŭ estis intervjuata de Andrzej Pettyn por Pola Radio kaj eĉ subskribis la Pragan manifeston, per kio li klare montris sian pozitivan rilaton al Esperanto. Estas evidente, ke ni, ĉeĥaj esperantistoj, pri nia plej alta diplomato en Aŭstralio vere fieris.

Partoprenis la kongreson 1224 aliĝintoj (tamen eĉ ne 1000 persone ĉeestis) el 57 landoj de 5 kontinentoj. La programo estis kiel kutime abunda kaj varia, do ĉiu povis elekti por si ion interesan. Oni traktis la kongresan temon „Justeco kaj toleremo en multkultura mondo“, akceptis la agadplanon „Esperanto 2000“, kaj

kiel kutime ĝuis riĉajn ne nur fakajn, sed ankaŭ multajn kulturajn kaj turismajn programerojn.

Krom la kongreso niaj karavanoj povis ĝui ankaŭ aliajn interesojn, kiel viziton de ĉeĥoslovaka klubo, tie renkontiĝon kun niaj samlandanoj daŭre vivantaj en Aŭstralio, viziton de tropika pluvarbaro kun ekkono de ties floro kaj faŭno, indiĝenan Aŭstralian kulturon, sed ankaŭ promenon tra aŭstralia nacia parko „Blua montaro“ (Blue Mountains) kaj eĉ koralajn fenomenojn kaj subakvan vivon el submara ŝipo ĉe Verda insulo (Green Island).

Petro Chrdle



Saluto de la ĉeĥa ambasadoro Jaroslav Suchánek al 82-a UK

Sinjoro prezidanto Lee, aliaj estimataj Estraranoj de UEA, aliaj eminentaj gastoj, karaj Gesamideanoj!

Mi ĝojas kunesti kun vi hodiaŭ, kaj diri kelkajn vortojn pri la graveco de via Kongreso kaj iomete pri la temo de la internacia lingvo Esperanto mem.

Ĉiam gravas la temo de via kongreso „Justeco kaj Toleremo en Multkultura Mondo“, sed speciale hodiaŭ, en la aktuala mondo kaj ankaŭ en nuntempa Aŭstralio, kiu estas unu el la plej multkulturaj socioj en la mondo.

Speciale rimarkinda estas la mesaĝo de subteno kaj kuraĝigo sendita al vi de via „Alta Protektanto“, la Ĝenerala Gubernatoro de Aŭstralio, Kavaliro William Deane, por via Kongresa Libro.

Li diris en sia mesaĝo, ke gravas havigi komunan lingvon por konservi unuecon kaj harmonion en iu ajn multkultura socio, en kiu oni estimas etnan diversecon, kaj ke, en tia tutmonda komunumo, pli da senperaj kontaktoj inter malsamaj landoj kaj malsamaj popoloj ĉiam helpas stimuli komprenon kaj pacon inter popoloj sen malfortigi naciajn kaj etnajn kulturojn.

Mi ŝatus aldoni al tio, ke kvankam iuj povas pretendi, ke unu aŭ eĉ kelkaj el la nuntempaj grandaj naciaj lingvoj povas servi kiel justaj internaciaj lingvoj, la realo estas, ke neniu el ili vere povas tion fari, ĉar neniu inter ili estas neŭtrala, kaj mi opinias, ke aliaj grandaj nacioj neniam permesos, ke tio okazu.

Tio, kion mi ĉiam aplaŭdas rilate

esperantistaron de la mondo, estas ĝia daŭra, persistema rekonado, ke la mondo ja havas lingvan problemon, kaj ĝia entuziasmo solvi tion per Esperanto. Laŭ mi, tio estas konsekvenco de la tiel nomata idealisma „Interna Ideo“ lige al Esperanto, kiun puŝas antaŭen multaj esperantistoj. Parolante tiel mi volas diri al vi - **NE PERDU TIUN IDEALISMON**. Via peno meritas sukceson.

Kiel vi scias, mi devenas el Ĉeĥio, malgranda nacio inter la nacioj de la mondo kaj popolo, kies lingvo ne estas multe parolata mondscale. Pro tiu fakto, mi, supozeble pli ol multaj aliaj, ege aprezas la valoron kaj gravecon de Esperanto. Kiel junan knabon, ĝi allogis min, kaj ĝi ankoraŭ allogas min nun, kiel plenaĝulon.

Mi fieras, ke inter via nombro da proksimume mil ducent homoj el pli ol kvindek diversaj landoj, estas ses samlandanoj miaj.

Al ili aparte, al la ĉeĥaj esperantistoj, mi diru, ke mi antaŭvidas ĝoje renkonti ilin dum mia kunestado en Adelajdo.

Kore kaj samideane, havu bonan plensukcesan Kongreson.

„Vivu Esperanto!“

Foto de la antaŭa paĝo:

Ĉeĥa ambasadoro en Aŭstralio Jaroslav Suchánek alparolas la kongresanojn.

45-jara jubileo de SET LANČOV

Malgraŭ pluva vetero alveturis en Someran Esperanto-Tendaron en Lančov 12.7.1997 preskaŭ 30 personoj por digne soleni (kun 100 tendaranoj de la unua etapo) tiun signifan jubileon. Pavel Sittauer, estro de SET, legis kelkajn salutleterojn kaj poste rememoris la tutan historion de SET, meritplenajn personojn, el kiuj jam multaj forpasis.

En nomo de ĈEA salutis Vladimír Hasala, komitatano de ĈEA. Partoprenis ankaŭ Věra Podhradská, ankaŭ ĈEA-komitatanino, kaj 2 eksterlandanoj, Rosa Werner kaj Dieter Berndt el Germanio. Ili ambaŭ kaj aliaj pluaj eksterlandaj esperantistoj instruas ĉiujare en SET-Lančov.

Partoprenis ankaŭ estro de loka vilaĝa prezidantaro en Lančov kaj promesis helpon ĉe modernigo de nia tendaro. SET konsistas el 37 kabanaj kaj moderne ekipita kuirejo. Jam ne sufiĉa sociala ekipo, kiun ni jam komencis rekonstrui kaj modernigi.

Ĉiuj partoprenantoj subskribis kronikon de SET. Ni ne rajtas forgesi, ke SET edukis centojn da esperantistoj kaj instruistoj. Domaĝe, ke instruado de la angla kaj germana superas Esperanton, nuna tempo estas por Esperanto ne favora, sed ni devas venki la situacion. Dum festena vespermanĝo kaj tostoj ni ĝis profunda nokto diskutis kiel regi kaj plibonigi funkciadon de nia tendaro. Ĝi estas nia edukejo de novaj esperantistoj. Ĉiuj eksterlandanoj miras kaj admiras, ke ĉeĥaj esperantistoj posedas en plej bela parto de suda Moravio rifuĝejon

por esperantistoj de tuta mondo.

Drahomír Kočvara

Sekureco de infanoj surstrate

Dum la 3-a etapo en SET Lančov mi estis surprizita, ke la infanoj, kiujn la gepatroj alveturigis en aŭtomobiloj, ne estis sekurigataj per rimenoj, sed sidis sur la genuoj de plenkreskuloj aŭ staris por rigardi el fenestro. La statistikoj en Germanio montris, ke ĉiutage mortas 15 infanoj surstrate, el ili 10 interne de aŭtomobilo. Dum akcidentoj la rimenitaj plenkreskuloj saviĝas kun zonzundaj bluaĵoj sur la korpo, sed nesekurigitaj infanoj estas katapultataj kaj mortas frapigante kontraŭ la fenestro aŭ falante sur la ŝoseon, ofte eĉ surveturigataj de aliaj aŭtomobiloj. Kredo, ke plenkreskulo kapablas teni infanon sur siaj genuoj eĉ dum karambolo, estas naiva iluzio.

Tial estis en Germanio akceptita leĝo, laŭ kiu estas infano konsiderata homo ekde sia naskiĝo kaj rajtas je propra sidloko kun sekurrimenoj. Ĉiuj infanoj dum veturado devas estis rimenitaj. Komprenoble, la normalaj sekurzonoj por plenkreskuloj strangolus la infanon ĉirkaŭ la kolo, sed estas fabrikataj specialaj luliloj por beboj kaj sidiloj kun altaj kap-apogiloj por pli grandaj infanoj de ĉiuj aĝoj kun eblo de firma sendanĝera fiksado. Fiksi nescesas ankaŭ ĉiujn valizojn, kiuj dum akcidento povus flugi interne de aŭtomobilo kaj vundi aŭ eĉ mortigi la pasaĝerojn.

P.H., Germanio

SKEF - nova tutslovakia E-organizaĵo

Dum kelkaj jaroj mankis al slovakiaj samideanoj tutŝtata Esperanto-organizaĵo, tamen ne mankis aktivado de esperantistoj en Slovakio. Dum Praga UK ili kunvenis cele fondi tutŝtatan organizaĵon, kiu subtegmentu la jam ekzistantajn regionajn organizaĵojn, povu reprezenti slovakajn esperantistojn eksterlande kaj kunordigu la enlandan agadon.

Fonda kongreso de Slovaka Esperanto-Federacio (per mallongigo SKEF) okazis en la hotelo Esperanto en Pribylina la 31-an de majo kaj 1-an de junio. Ĝi akceptis la statuton de SKEF kaj elektis la unuan skipon de funkciuloj: inĝenieron Juraj Gondžúr (Žilina) kiel prezidanton, vicprezidanton Mária Tomašovičová (Nové Mesto nad Váhom),

sekretarion inĝ. Lucia Fedorová (Žilina), ekonomon Marieta Beláňová (Bratislava) kaj estraron Milan Neubeler (Poprad).

Nome de Ĉeĥa Esperanto-Asocio alparolis la ĉeestantaron vicprezidanto Petro Chrdle, sed ĉeestis ankaŭ aliaj oficialaj gastoj de Ĉeĥio, Vladislav Hasala, ĈEA-komitato, kaj Stanislava Chrdlová, ĉefdelegitino de UEA por ĈR.

Ni kore deziras al la nova asocio sukcesojn en sia poresperanta agado kaj esperas, ke regos minimume same bonaj rilatoj inter ĈEA kaj nova SKEF, kiel ili regis dum ekzisto de iama SEA.

Petro Chrdle



☆ Starto 4/1997 ☆

Ústí nad Labem

Pasintjare en oktobro komenciĝis la unua jaro de nova Esperanta kurso en universitato de J. E. Purkyně en Ústí nad Labem. El dek kuraĝuloj finis nur kvar studentinoj, du gimnaziaj kaj du universitataj, tamen ili esperplenigas nin.

Nia klubo interalie preparas novan ĉeflingvan ilustritan lernolibron laŭ malnov-nova metodo, kiu konvenas eĉ por lingve netalentaj same kiel por lingvoscienculo pensantaj homoj. La lernolibro eldonitos verŝajne ĉi-jarfine. Eventualaj interesigantoj bonvolu kontakti nin je la adreso: Libor Mikulášek, P.O. BOX 229, 400 01 Ústí nad Labem.



Retrorigardo al la 49-a IFK en Košice (10.-17.5.1997)

La kongreson de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEF), aŭspiciis inĝ. Alexander Rezeš, slovaka ministro por trafiko, poŝtoj kaj komunikiloj, kaj Ĝenerala Direkcio de Fervojoj de Slovaka Respubliko en Bratislava. Partoprenis pli ol 200 kongresanoj el 23 eŭropaj landoj, 17 el Ĉeĥio.

Oni raportis pri IFEF, SAFE, en la faka programo estis prezentitaj prelegoj *Historio kaj nuntempo de la fervojo de Slovaka Respubliko* (inĝ. Magdaléna

Feifičová) kaj *Historio kaj evoluo de la fervojaj horarlibroj* (Joachim Giessner). Nia membro inĝ. Ladislav Kovář parolis pri *Modernaj informistemoj por vojaĝantoj*, tre interesan videobendon pri la plej moderna aŭstria ranĝstacio Villach Süd prezentis Martin Stupping.

Terminara sekcio raportis pri revizio de PIV koncerne fervojfakajn nociojn kaj pri revizio de 944 fakesprimoj por la datumbanko „Rail-Lezic“ de Internacia Fervojunio. La ĝisnuna rezulto troviĝas sur disketoj CD-ROM kaj 13-lingva serio da dulingvaj terminarlibroj. Inter ili ankaŭ bele bindita fervoja fakvortaro Esperanta-Ĉeĥa kaj Ĉeĥa-Esperanta (kun pli ol dekmil fakesprimoj), kiu kostas 30 DEM kaj oni povas mendi ĝin ĉe Vp de IFEF inĝ. István Gulyás, Rákos ut. 98.I.9., HU-1155 Budapeŝt.

Dum la publika plenkunsido oni decidis plialtigi membran jarkotizon al 8 svisaj frankoj. Kiel nova ĉefdeligito de IFEF estis elektita Jean Ripoché el Francio, kiel lia anstataŭanto Jindřich Tomášek el Ĉeĥio. Nova komisiito por IFES (Skisemajnoj) fariĝis Peyrouly Hubert el Francio.

Jindřich Tomášek

Tosto en alteco 1350 m

En Ŝumperk 17. 5. 1997 koncentriĝis 57 membroj de 10 kluboj por busi kaj poste grimpi al la monto Praděd, kie ili tostis simbole per verda likvoro. Dum reveturo ni vizitis lignan preĝejon de sankta arkiangelo Miĥaelo en Maršikov.

Drahomír Kočvara

La unua kongreso de kroataj esperantistoj

okazis dum lasta maja kaj unua junia tagoj en ĉefurbo de Zagreb kun 150 aliĝintoj.

Kongreson malfermis himnoj kroata kaj esperanta kun minuto da silento honore al esperantistoj mortigitaj dum la intercivitana milito.

Kulturana programon esperantlingve prezentis aktorino Vida Jeriman kaj Studenta Esperanto-Klubo.

Estas mirinde, ke viglaj kroataj samideanoj fakte tuj posta fino de milito sukcesis ne nur prepari nacian kongreson en tiu agrabla urbo, sed ankaŭ eldonigi esperantan poŝtmarkon, lanĉi moneron de 25 kunaĵoj (tiea monunujo) kun simbolo de kongreso, eĉ kandidatigi urbon Zagreb por Universala Kongreso en jaro 2000.

Karel Červenka

(sola ĉefa partopreninto)

Kvara renkontiĝo de Maljunularo

okazis en klubejo de EK Ostrava Vítkovice 31.5.1997. La iama junularo informis pri agado en siaj kluboj kaj pri perspektivo labori kun nova junularo, ekz. skoltoj.

Bicikle al IFEF-kongreso

veturis s-ano Oldřich Schwetter (71-jara) el Havířov al Košice (381 km) en aprilo kaj tuj en majo (1.-4.5.97) li partoprenis ankaŭ Internacian Renkontiĝon de esperantistoj en Altaj Tatroj.

Esperantista Klubo en Prago
regulaj kunvenoj de la klubo okazas ekde nun ĉiumerkrede inter la 17-a kaj 20-a horoj en la kunvenejo de invalidoj en la Malnova Urbo de Prago, Rybná str. 24.

Esperantista memorŝtono

antaŭ la Kongresa Centro en Prago estis makulita per grafitioj. Dank' al ges-anoj Hubnová kaj Krajiček la ŝtono estas denove pura.

Sukcesa renkontiĝo en Hungario

La pitoreska urbo Nagymaros gastigis 31-an Internacian Amikan Renkontiĝon de Hungaraj Fervojistaj Esperantistoj (5/6.7.1997), kiuj festis 40-jariĝon de sia organizo kaj organo Hungara Fervojista Mondo. Partoprenantoj ankaŭ el Aŭstrio, Ĉeĥio, Slovakio kaj Rumanio plantis memor-arbon surborde de Danubo, klinis sin antaŭ memortabulo de esperantista pioniro József Takács kaj vizitis per nostalgia trajno la proksiman lokon Zebegény kun interesa ŝipmuzeo kaj memordomo de pentristo István Szönyi (1894-1960).

Jindřich Tomášek



Nia vojo en Anglujon

El Ĉeská Třebová ni trajne forveturis dimanĉe matene la 29-an de junio 1997 kun ses knabinoj 12-16jaraj (Barunka, Iva, Jana, Katka, Petra, Šárka), mia nepo Matouš, kiu estis la plej juna, kaj kun mia frato Pavel. Buso de societo Rusoliatourist veturigis nin el Prago tra Germanio, Nederlando, Belgio kaj Francio, kaj lunde la 30-an de junio atendis nin gesamideanoj en Londono.

Post trarigardo de la urbo-ni veturis 5 horojn en rapidbuso al Skiptono, kie nin atendis Edith Sheldrick kaj Jones Malcolm. En kvakera domo ni prezentis nian folkloran programon.

Marde Jones, Edith kaj kvin knaboj-esperantistoj montris al ni vojaĝoficejon, redakcejojn de ĵurnalo, lernejojn en Barnoldswick kaj muzeon. Poste

ni vizitis kastelon en Skipton, kies posedanto estas esperantisto kaj preparis intermalingvan flugfolion. Pri nia vizito en Skipton aperis artikoloj kun fotoj en kvar ĵurnaloj.

Merkrede ni busis tra Birmingham al Wolverhampton, kie nin atendis Anne Morse Brown kun sia aŭtomobilo. Ŝi forveturigis nian tutan grupon al sia domo en Womborne. Antaŭ lokaj esperantistoj ni vespere kantis, dancis kaj prezentis scenon el la vivo de sankta Venceslao.

Ĵaŭde Anne instruis al geknaboj modelojn el speciala pasto, kaj vespere ni vizitis kun ŝia familio kaj klub-

anoj ŝekspiran teatraĵon „Tempesto“. La klubanoj donacis al ni riĉe ilustritan lernolibron de Esperanto.

Vendrede nin Anne veturigis al Jenny, kiu atendis nin kun infanoj en abatejo proksime de Painswick. Venis ankaŭ ĵurnalisto kaj intervjuis ĉeĥajn kaj anglajn geknabojn pri Esperanto.

Sabate ni entreprenis grandan ekskurson al Gloucester kun Jenny kaj ŝiaj esperantistaj infanoj. Ni vidis vendejon de tajloro de Gloucester, muzeon de akvovojoj, folkloran muzeon kaj muzeon de romiaj soldatoj.

Dimanĉe Jenny montris al ni la urbon Painswick, ankaŭ la domon de vartistino de la nuna angla reĝino (kiel infano ŝi tie pasigis somerojn). Posttagmeze ni grimpis monton ĉe Painswick, de kies pinto ni vidis urbojn Cheltenham, Gloucester kaj Stroud.

Lunde matene nia grupo prezentis en lernejo de Painswick kantojn kaj dancojn antaŭ gelemantoj kaj geinstruistoj. Poste ni devis adiaŭi kaj reveturi al Londono. Niaj gastigantoj (Grietje Buttinger, Will Green, Anthony Rawlinson, Jagues Wilfrid) montris ĉiu al siaj gastoj alian programon, ekz. mi vidis ĉinan kvartalon, barierojn de rivero Thames, Tower Bridge kaj nulan meridianon en Greenwich.

Marde vespere ni forveturis, al Prago ni busis rapide kaj agrable, sed hejme nin atendis informo pri la katastrofaj inundoj.

Zdenka Novotná



La ekonomia situacio en Togolando

Antaŭ multaj jaroj, kiam en Togolando regis ununura politika partio, la vivkondiĉoj estis malfacilaj, ĉar la salajroj malsufiĉis. En 1990 envenis la landon demokratia vento, sed la ŝtata kaso malpleniĝis pli kaj pli. Ankaŭ la 9-monata striko (1992 -1993) blokis la aktivecojn, do evoluon de mondonaj laboroj. Ĉio stagnis, multaj detruitaj publikaj bienoj restas riparotaj. La popolo suferis pro malsato kaj malsano, kaj la mon-devaluto la situacion ankoraŭ pligravigis. Rapide kreskis la prezo de varoj, eĉ veturigkostoj, estis aldonita nova imposto. Aktualaj salajroj ne estas regulaj, sed neniu porlaborista sindikato reagis kontraŭ. De tago al tago la situacio malboniĝas, eĉ emeritoj malfacile akiras sian pensi-monon. Ĉio ĉi estas obstaklo al bona fartado en la lando. En similaj cirkonstancoj helpas kutime eksterafrikaj landoj, ĉar „demokratio“, la vera, ankoraŭ ne sidas en Afriko.

Antaŭ la nova jaro 1997 la registaro promesis reguligi la salajrojn de laboruloj, kies salajroj fontas el la ŝtatkaso. Ĉiuj devis prezenti dosieron konsistantan el akirita(j) diplomo(j), enlanda karto (aŭ pasporto), atestilo profesia. Unumonata kontrolo malkovris plurajn fraŭdojn: akuzitoj utiligis diplomojn de samnomaj fratoj, aliaj ricevis duoblajn salajrojn aŭ tiujn de jam mortintaj laboristoj. Post la kontrolo multaj perdis siajn postenojn.

Afrikanano

La angla en Sud-Ameriko

Luděk Frýbort, atomfizikisto kaj feje-tonisto, vivanta en Germanio, skribas en ĉeĥa gazeto serion de vojaĝraportoj pri siaj spertoj el Sud-Ameriko:

„Ĝis hodiaŭ mi konsideris japanojn mondĉampionoj en la dura, obstina fias-kado antaŭ la lingva muro. Sed mi nun devas diri al vi: la sudamerikanoj elegante triumfas super ili.

Siatempe mi elnombris en Japanio entute kvin homojn, kiuj kapablis paroli uzeble la anglan. En Ĉilio kun la najbara Argentino mi trovis ununuran tiaprecan ulon kaj mi malkaŝos al vi lian nomon, ĉar li prezentas escepton pli raran ol estas blanka elefanto. Temas pri dana enmigrinto Knudsen.

El la ceteruloj kapablas regi la anglan neniu, tute neniu, nek la dungitoj de la vojaĝoficejoj, nek la profesiaj ĉiĉeronoj kaj informistoj, nek policanoj kaj taksioŝoforoj. Kaj ĉi tiun faktan ili akiras rezulte al sia diligenta lernado de la angla en lernejo. Matene vi povas observi knabinojn en lernejoj uniformoj, kiuj ripete memorigas anglajn vortojn kaj reciproke ekzamenas sin. Sed kiam vi kuraĝus alparoli ilin, vi rezultigus al ili nervan ŝokon.

Simile kiel la japano, ankaŭ la sudamerikano ne kredas, ke fremda lingvo povas servi al io alia ol al turmentado de la lerneja popolo. Ja ĉiu atingibla sudamerika mondo parolas la hispanan...

Do ili obeeme lernas vortetojn, ne-regulajn verbojn, verbajn aspektojn, ili parkeras Ŝekspiron de antaŭe kaj de malantaŭe, sed demandi pri la vojo al stacidomo ili ne kapablas. Kaj respondi tian fremdulan demandon des pli ne.”

Tradukis Karel Kraft

RAVI PER ALITERACI'!

Eli Urbanová: *Peza vino*. Spegula eldono esperanta-ĉeĥa. Arangis kaj en la ĉeĥan trad. Josef Rumler. (Dobřichovice) KAVA-PECH (1996). 37 p.

Inter la fasko da verkoj aperintaj okaze de la Praga UK (1996) jen unu plia, eble la plej malatentata (sur versojn kraĉas samidean', kiel veis Kalocsay), sed neniel la plej sensignifa.

Ŝajnas, kvazaŭ per ĉi dekduo da poemoj Eli Urbanová reaperas al ni estiel la knabina Eliška Vrzáková: jam en 1941, nur 19-jara, ŝi aperigis la unuan ĉeĥlingvan poemaron *Spegulo*. De tiam, ĝis la Stafeta Nur tri koloroj (1960) pasas longa verko-paŭzo, evidente kun la elekto de nova verk-lingvo. Sed restas iom mistere, ĝis kia grado ŝi vere adoptis Esperanton por sia *opus magnum*, *Hetajro dancas* (1995), ĉar „ĉi romanon verkis la aŭtorino samtempe en la ĉeĥa versio" (Josef Rumler, p. 36 de la recenzata verko). La pledon de Rumler por ellaborita, supla, „abunda kaj redunda" lingvo literatura motivas eleksteraj konsideroj. Male al Piĉ, kies lingvo-krea genio fontas el la latentoj de Esperanto mem. Tion multaj nek komprenis nek perceptis. Pro tio la reagoj: aŭ surfaca imito (kiel ĉe Rumler kaj lia Praga Skolo) aŭ blinda rifuzo. La kvin-tesencon de la lingvo de Piĉ nur kelkaj kaptis kaj adaptis ... La litomiŝlaj akvoj longe filtriĝos tra la verdaj sedimentoj, sed ili elfluos en kristala puro kaj freŝo kaj longe nin delektos ...

La nuna poemaro de Eli Urbanová iel fermas vivo-cirkolon: la aŭtorino revenadaŝ ... ne nur al sia ĉeĥeco gepatra, sed ankaŭ al siaj temoj preferataj. Same kiel Piĉ estas revenanto, ankaŭ Urbanová prezentas siajn temojn en ĉiam novaj nuancoj kaj facetoj, tamen sen gurdi aŭ tedi. Ŝi simple ne satiĝas de la vivo-voluptoj jen karnaj, jen pala-taj. Ĉar „ne volas trankviliĝi la pulseganta sango" (p. 18). Sed la pokalo, iam plena ĝis-rande, konsumiĝas, la peza vino elĉerpiĝas. Jen kial melankolio kaj malgajo traste-bas ĉi tardan lirikon. Fortika kandelo brulas ĝisstumpe ... Kaj la saliko (p. 26) iĝas simbolo:

*Saliko estas mi, saliko:
iom kaduka, iom verda,
jam rezignanta, mi plu perdas
la foliaron ... Aĥ, amiko!*

Sed unu logo ne velkis: la lingvo, la literaturo, la poezio:

*Kaj mi pri amo kaj mi pri la tomb',
Kiam mi versas, estas mi seksbomb'.*

El la iamaj ravoj karnaj restis la rezi-gnacia konfeso:

*Neniu venas: - Mia kara, ci!
Aĥ, ravi vin per aliteraci'!*

Tra la traduko de Rumler aŭdiĝas la aŭtenta voĉo urbanova, kiel ni konas ĝin precipe el ties tardaj verkoj: *Verso kaj larmo* (1986) kaj *Vino, viroj kaj kanto* (1996). Espereble ĉi voĉo longe plu aŭdiĝos ..

Reinhard Haupenthal

TIEL EN MOSKVO, KIEL EN VAŜINGTONO

Václav Havel: **Aŭdienco**. Unuaktaĵo. Trad. Josef Vondroušek. (Dobřichovice): KAVA-PECH (1996). 39 p.

La politikaj ŝanĝigoj en orienta Eŭropo kaŭzis, ke iamaj degraditoj ascendis al la rango de ŝtataj prezidentoj: oni vidis ĉi ekzemplojn tiel en Pollando kiel en Ĉeĥujo, kie la antaŭa „disidentoj“ Václav Havel okupas nun la plej altan pozicion ŝtatan.

Ĉi unu-aktaĵo de Havel ne povas pretendi altan valoron beletran. Bedaŭrinde nenie oni diras, **kiam** ĝi estis verkita kaj ĉu ĝi diskonigis ankoraŭ dum la regado de komunistoj. Ajne, ĝiaj roluloj, la anonima „ĉefo“ de bier-farejo, kaj Vaněk (la portreto de Havel mem) reprezentas la du klasojn de regantoj kaj regatoj. Sed ne en klara rol-divido de supereco kaj malsupero. Pro sia kontakto kun la medio de verkistoj kaj aktoroj Vaněk povus peri al sia ĉefo aktorinon je kiu ĉi lasta bavas en senbrida lascivo.

Esenca karakterizaĵo de la verko estas ties lingvo-guŝaj paroloj: eterna ripeto de neni-diraĵoj post kiuj oni kaŝas la veran sencon kaj esencon de la vortoj. Malgraŭe, ĉiuj komprenas, inkluzive de la publiko. Desmasko dank' al maskrado. La komedio kiel sola ventolilo en la sufoko de subpremo, spionado kaj malfido. Jen la dramaturgio de Dürrenmatt, laŭ kiu sole la komedio konvenas al nia mondo bankrotema, kie la potenco anonimiĝis kaj kie nur la burokrataj filistroj kapablas ĝin reprezenti. Eble male al Havel kaj la aŭtoroj verkintaj el

sama sinteno sub samaj kondiĉoj, Dürrenmatt konsciis, ke ĉi situacio univefsale samas: tiel en Moskvo, kiel en Vaŝingtono kaj eĉ en Berno ...

Tial ĉi dokumento opona al malhumana sistemo komunisma estas nenio alia ol universala sperto, ĉar en sia kerno ĉiuj reĝimoj metas sin absolutaj kaj sekve estas totalismaj kaj faŝismaj (ĉar kio alia estas faŝismo, se ne la absolutigo de la propra star-punkto). En la kazo de Havel okazis nura rolo-ŝanĝo: Vaněk avancis kaj nun estas la bierfarista ĉefo en la Praga burgo ...

Ĉi verkon tradukis unu el la grand-sinjoroj de la ĉeĥa Esperanto-movado, Josef Vondroušek (1904-1995). Lia lingvaĵo fluas glata kaj sendifekta kaj sendube pligrandigas la ĝuon legi aŭ spekti la drameton.

Reinhard Haupenthal



STARTO homoj kaj nombroj ĉirkaŭ ĝi

Ekde kiam nia asocia organo transiris en presejon en Opava, ricevas ĝin niaj legantoj ĉiun duan monaton sesfoje en la jaro. Mi opinias, ke konvenus al la membraro alproksimigi homojn kaj nombrojn en fono de tiu ĉi afero.

Same kiel nia tuta movada laboro, ankaŭ prizorgado de Starto ne estas koncentrigita en unu loko. La redaktoran funkcion plenumas M. Malovec en Brno, al kiu oni sendu ĉiujn publikigindajn informojn. Bedaŭrinde, tiusence niaj membroj kaj kluboj ne tro diligentas, tial nia redaktoro devas ofte plenigi vicon da Starto-paĝoj mem ĉerpante el siaj profundaj scioj de Esperanta originala aŭ tradukita literaturo. La kompletan komputiligitan tekston transprenas de la redaktoro la subskribinto, iamfoje kun diskuto pri diversaj ŝanĝoj aŭ kompletigoj. Post interkonsento - plej ofte telefona - estas farataj ankoraŭ eventualaj necesaj ŝanĝoj kaj la originala teksto kun (nur) buŝa mendo iras en la presejon OPATISK en Opava. Mi ne kaŝas, ke kun ĝia posedanto Vladimír Pravda kaj ĝia oficistaro mi estas en bonegaj rilatoj. Ĉe la transdono ni ankoraŭ pridiskutas diversajn teknikajn demandojn, kiuj ĉiam aperas, kaj ni interkonsentas precizan daton, kiam estos Starto finpreta. La preslaboroj kutime plenumiĝas en kvin labortagoj, sed rekorde tio okazis nur en du tagoj. Pretan eldonkvanton la presejo transportas en kunvenejon de *Matices slezská* en Opava, kie oni faras ekspedajn laborojn de Starto.

En momento, kiam Starto eniras la presejon, preparas en Prago la komitata-

nino Květa Hubnová precizan adresaron - por ĉiu numero memstare. Do, ŝi estu adresato de ĉiuj adresosanĝoj, malaligoj kaj foriroj. La adresaron en komputildisketa formo ricevas ing. Jiří Kreuzberger en Opava, kiu senprokraste presigas adresajn etiketojn. En antaŭanoncita tempo atendas novan Starton jam preparita ekspeda teamo, kiu garantias ĝian rapidan dissendon. En la teamo alternas membroj de la Esperanto-rondeto Ostroj Opava: gesamideanoj Jar. Žák, Jos. Solnický, M. Matýsková, M. Grimová, L. Zapletalová, J. Kreuzberger, J. Kovář. Ili jam havas sufiĉan rutinon, tial la ekspedado fluas rapide kaj senprobleme. Kutime la duan tagon matene transprenas la tutan kvanton aparta ĝiceto de la ĉefa poŝtofacejo en Opava, por ke ĉiu enlanda leganto havu Starton sekvo-

matene.

En la pasinta jaro aperis 6 numeroj de Starto en averaĝa eldonkvanto 1430 ekzempleroj. Tio kostis 53.230 Kč, do neta prezo de unu peco estas 6,20 Kč. Krom poŝtaj elspezoj - en 1996 tio estis 21.153 Kč - oni devas alkalkuli pluajn pagojn - adresetiketojn, modesta honorario de la redaktoro kaj por ekspedaj laboroj. La entutajn elspezojn altigas ankaŭ senpaga interŝanĝo de Starto kontraŭ aliaj gazetoj, devigaj ekzempleroj kaj sendaĵoj al Esperanto-muzeoj kaj simile. En la pasinta jaro la asocio pagis por ĉio ĉi entute 80.590 Kč, do fakte ĉiu numero al ni kostis 9,38 Kč. Future la prezo certe plialtiĝos, sekve utilas ŝpari ĉiun superfluan ekzempleron. Tial la asocio daŭre precizigas abonantaron kaj evitas sendadon de la asocia organo al homoj, kiuj ne kotizas ĝustatempe kaj laŭ valida kotiztabelo.

VI. Kočvara

Ĉeĥa Esperanto-Junularo invitas al

9-a VINA SEMINARIO

25. - 28. 09. 1997 en Vracov

Atendas vin prelegetoj pri vinproduktado kun gustumado, ekskurso al vinproduktejo, kvizo pri botelaj premioj, busekskurso al ĉirkaŭaĵo, vespero en privata vinkelo, amuzvespero kun folkloro zimbazona ensemblo.

Drinku ne por fali, sed por suprenleviĝi!

Kostoj ekde jaŭdo estas 460 Kč por ĈEJ-ano, 620 Kč por ceteraj, ekde vendredo 380 Kč por ĈEJ-ano, 490 Kč por ceteraj. La prezo inkluzivas tranoktadon, manĝon, busekskurson. Aliĝojn ĉe: Jana Burianová, Renneská 35, 639 00 Brno.

Esperanto-klubo en Ústí nad Labem
invitas vin al

10-a INTERNACIA

KULTURA FESTIVALO

26-a ĝis la 28-a de septembro 1997

rememore al Jiří Kořínek kaj Tomáš Pumpr okaze de ilia 91-a naskiĝdatreveno. Al ili estos dediĉia la ĉefa kultura programo sabate vespere, sed atendas vin ankaŭ kultura matineo, ekskurso al Teplice kaj aliaj programeroj. Aliĝkotizo 50 Kč por la programo, kun manĝo kaj tranoktado 395 Kč. Aliĝojn akceptas: Marie Moučková, Koštov 110, 400 04 Ústí nad Labem.

Esperanto-kluboj Pĕřerov, Prostějov kaj

Olomouc okazigas

la 25-an de oktobro 1997

RENKONTIĜON DE MORAVIAJ KAJ SILEZIAJ ESPERANTISTOJ

en la klubejo de Pĕřerov (fervoja ĉefstacidomo). Oni prelegos pri agado de Moraviaj Esperanto-Pioniroj kaj pri Esperanto-movado en la regiono Haná. Bonvenaj estos ankaŭ gastoj el Bohemio kaj eksterlando, monkontribuo libervola. Bedaŭrinde ne eblas certigi tranoktadon, ĉar ĉiuj tranoktejoj estas okupitaj de personoj, kiuj perdis domon ĉe inundoj. Aliĝu ĉe: Libuše Filipová, Nádraží 146, 768 11 Chropyně.

3-a kongreso de AEH

10. - 17. 11. 1997

La tria kongreso de Asocio de Handikapitaj Esperantistoj, origine planita al julio, devis esti prokrastita al novembro. Ĝi okazos en la pensiono Espero en Skokovy, kiu estas ekipita eĉ por rulseĝuloj kaj ĉirkaŭita de bela naturo. Interesiĝantoj skribu al Josef Vaněček, Na Okrouhliku 21, 530 03 Pardubice.



Kion signifas „ne devi“?

Zdeněk Hršel

Lastatempe oni povas renkonti multajn kaj oftajn ekzemplojn de nezamenhofa uzo de la moda helpverbo „devi“ en negacio. Jam unu ekzemplo, eble la plej freŝa (Heroldo, 1997, n-o 4/5):

„Sen Li, kiun prezenti al la esperantistaro oni jam **ne devas**.“ Kaj: „Lian verkaron prezenti al la esperantistaro oni jam **ne devas**.“

La leganto bonvolu mem bone konscii, kion signifas ĉi tiuj frazoj:

a) ĉu estas malpermesite, ke oni prezentu lin (aŭ lian verkaron)?

b) ĉu ne (plu) estas necese, ke oni prezentu lin (aŭ lian verkaron)?

Sendube la aŭtoro de la frazoj volis esprimi la signifon sub „b“. Sed ĉu tio estas ĝusta?

Ni prenu kelkajn zamenhofajn ekzemplojn, nome el la antaŭparolo al Fundamento de Esperanto, kaj komparu la signifojn.

1. „**Neniu** persono kaj **neniu** societo **devas** havi la rajton arbitre fari en nia Fundamento iun eĉ plej malgrandan ŝanĝon!“

2. „La Fundamento de Esperanto tute **ne devas** esti rigardata kiel la plej bona lemolibro kaj vortaro de Esperanto.“

3. „Se ia aŭtoritata centra institucio trovos, ke tiu aŭ alia vorto aŭ regulo en nia lingvo estas tro neoportuna, ĝi **ne devas** forigi aŭ ŝanĝi la diritan formon, sed ...“

Kiun signifon havas ĉi tie la negacia formo de „devi“? Nepre ne tiun, kiun ni signis per „a“. Tute same kiel en la rusa („ty ne dolžen“), ĉar lia familia lingvo estis ja la rusa. Ĝi respondas ankaŭ al la angla „you must not“.

Kiel esprimi zamenhofe la signifon sub „a“? Per **ne bezoni**.

PIV enhavas multe da ekzemploj de ambaŭ modaj helpverboj en negacio el la plumo de Zamenhof. Estas bedaŭrinde, ke nacilingvaj lemolibrooj simple ellasas ĉi tiun temon, tiel ke anoj de lingvoj, kiuj ne uzas la „rusan“ aŭ „anglan“ signifon, povas facile uzi tiujn ĉi tiom gravajn modajn helpverbojn tute malĝuste. (Same faris la aŭtoro de tiu ĉi atentigo proks. dudek jarojn).

Noto: la substrekaĵojn faris la aŭtoro.

Rimarko de la redaktoro:

Komparu kun la ĉeĥa:

máš tam jít = oni ordonas al vi iri tien

nemáš tam chodit = oni malpermesas al vi iri tien iri

NI KONDOLENCAS

En julio perdis la Klubo de esperantistoj en Bmo du siajn membrojn:

La 25-an de julio 1997 forpasis en aĝo de 74 jaroj s-ano Jiří Procházka el Kuřim, la 30-an de julio 1997 foriris ankaŭ Ing. Vladimír Slavík, CSc el Bmo en sia 76-a jaro.

Homonimoj en Esperanto, konsiderataj nomenklature 12

Josef Kavka

-IT-

Homonimecon povas kaŭzi ankaŭ koincido de la radikfina kun la particip-sufiksa -IT-.

El la **fundamentaĵoj** ni trovis jenan seson:

1. **granito**, **plutona magmorokaĵo**, sed grano = mainova pezunuo;

2. **mediti**, sed **medo** = mieltrinkaĵo;

3. **pirito**: Jen ni ne povas akcepti la PIV-an difinon: 1. komuna nomo de kelkaj sulfidoj, kupra k.a. La 2-a difino de FeS_2 devus kompletigi per la kristal-sistema aparteno: kubsistema, ĉar la saman ĥemian formulon havas la romb-sistema markazito; piro ja estas alispecaĵo...;

4. **spirito**: Jen klasika ekzemplo de homonimeco, kiu tute ne ĝenis, kvankam spirit-a ne estas spir-ita;

5. **viziti**: Por fari vizit-on, ne ĉiam oni bezonas vizon...;

6. **zenito**, la astronomia termino ne estas en konekso kun la japana budhisma skolo.

Da **oficialaĵoj** jenas dekunuoj:

7. **agiti**, la **transitiva** verbo neniam povas liveri konfuzajn ag-iti, ĉar agi, kiel netransitiva, malhavas pasivan voĉon;

8. **bandito**: apenaŭ ekzistas verbo „bandi“;

9. **dinamito**: Ankaŭ „dinami“ ne ekzistas;

10. **grafito**, la heksagona formaĵo de karbono havas nenion komunan kun la nobela titolo grafo;

11. **komandito**: komand-ito;

12. **kredito**: kred-ito;

13. **moskito**, **zamenhofaĵo** oficialigita, indikanta dipteron, dum mosko, oficialaĵo, pli eble devus fariĝi mosho kaj la subfamilio de cervedoj (*Moschinae*) devus fariĝi moshenoj, por respekti la takson-formon de la internacie kodigita nomenklaturzoologia;



14. **orbito** kaj **orbo** estas nocioj astronomiaj. Homonimeco praktike ne ĝenas, ĉar la eventuala verbo „orbi“ estas neversajna;

15. **stalaktito**: stal-akt-ito?;

16. **termito** estas homonima duopo: 1. insekto el la ordo de arĥipteroj (*Termes*), 2. miksaĵo kapabla produkti altan temperaturon; termo (zamenhofa) servas en algebro kaj filozofio;

17. **transito**. Trans-ito ne eblas, ĉar eventuala verbo „transi“ estus netransitiva.

Jen vortludo...

Neoficialaĵoj abundas (44):

18. albito estas la natria feldspato, dum albo = blanka pastrovesto;

19. alunito ricevis en PIV dubindan difinon: alunerco. Pli bone estus difini: hidrosulfato alumini-kalia, dum alunio, la fundamentaĵo, devus konservi la pli ĝeneralan difinon, nome la 2-an de PIV: analoga kombinaĵo de diversaj katjonoj unu- kaj tri-valentaj. En *Portmann-Rogers* (1993) alunito mankas, dum alunio malprave ricevis la difinon de alunito;

20. amanito, la fungo; Amano, la ĉefurbo de Jordanio;

21. amonito, la fosilia cefalopodo, estas nomita laŭ Amono (zamenhofaĵo), la egipta dio;

22. balzamito (laŭ PIV *Chrysanthemum balsamita*, sed laŭ la nuntempa nomenklaturaro *Balsamita major*) estas aromherbo devenanta el Antaŭa Azio. Balzamo, botanike konsiderata, estas bonodora rezino de diversaj arboj (*Altingia excelsa*, *Callophyllum antillanum*, *Commiphora opobalsamum*, *gileadensis*, *Copaifera officinalis*, *langsdorffii*, kaj *guyanensis* kaj *multifuga*, *Daniellia oliveri*, *Dipterocarpus alatus*, *indicus*, *gracilia*, *turbinatus* kaj *trinervis*, *Liquidambar orientalis*, *formosana* kaj *styraciflua*, *Myroxylon balsamum*, *Pinus pinaster*, *halepensis*, *longifolia*, *merlusii* kaj *caribaea*). Bonvolu pardoni pro la detala elnombro, kiu tamen povus interesi esperantistojn el diversaj mondopartoj;

23. barito, homonima kun bar-ito estas baria nek oksido, nek hidrokso, sed

sulfato, minerale kristaliganta en romba sistemo. La difinon de PIV necesas ĝustigi;

24. bonito estas franceska nomo por fiŝa specio (?) el skombredoj (*ru: tunec, cs: tuňák menší*, sed tiu apartenas ne al *Scombridae*, sed al *Thunidae*!) Ŝajnas do, ke la nomo estas evitinda. Multaj nacilingvaj vortaroj, ekz. *Wells* (1969) ne registras ĝin;

25. budito, laŭ PIV flava motacilo, apartenas al simile dubindaj nomoj, netroveblaj en la zoologia nomenklaturaro;

26. ebonito, la vulkanizita kaŭĉuko, homonima kun ebon-ito. Ebono estas fundamenta termino por malhela ligno de diversaj arboj, ekz. *Diospyros (Ebenaceae)*, *Dalbergia (Fabaceae)*;

27. ferito, lanĉita de Kaloĉaĵo, estas laŭ PIV pura fero en tri kristalsistemaj formoj. Ni povas aldoni, ke la termino estas uzata ankaŭ por natura fero kun almiksaĵo de nikelo. Fine, kiel teĥnika materialo, ĝi estas uzata por feromagnetaj radioricevil-antenoj. Aliflanke, feritino, laŭ *Portmann-Rogers* (1993) estas proteino stokanta feron. Jene oni timas homonimecon nek kun -IT-, nek kun -IN-;

28. filito, homonima kun fil-ito, estas rokaĵo estiĝinta pro milda metamorfozo de argil-ardezo;

29. fluorito estas kubsistema mineralo, ĥemie kalci-fluorido;

30. fosforito, laŭ PIV mineralo, sed pli eble sedimenta rokaĵo, konsistanta el pluraj fosfatoj, do ne sole el apatito. Fosforo, la nomo de ĥemia elemento, troviĝas en Fundamento;

31. gambito, la ŝaktermino; gambo, la membro;
32. glosito, inflamo de lango; glosio (zamenhofa), laŭ PIV: vort-klarigo, sed uzata ankaŭ ĝeneral-sence, kiel rimarkigo, amendo, noto;
33. gravito, la fizika forto, homonima kun grav-ito, sed ekster ĉiu konfuzdanĝero, ĉar eventuala verbo „gravi“ ja estus netransitiva, do sen ebleco akcepti pasivan sufikson;
34. irito. Ebla konfuzo inter irit-a kaj irita povus interesi ŝercemulon...;
35. kainito, la utilega mineralo kalimagnezia, ricevis sian nomon laŭ la helena adjektivo *kainos* = nova, ne laŭ la biblia Kaino;
36. klorito, laŭ la helena fonetiko pli bone: ĥlorito. Ĉi tiu mineralnomo, sam-



- kiel la ĥemia elemento ĥloro, venis pro iliaj koloroj (*ĥloros* = verda);
37. kolito. PIV referencas al kojlitio. Tion oni apenaŭ komprenas, ĉar la intestoparto nomiĝas latine *colon*. Jen timo pro homonimeco kun kolo (latine *collum*);
38. kordito, eksplodaĵo; kordo (fundamenta), termino muzik-instrumenta, anatomia, geometria;

39. kvarcito, sedimenta rokaĵo; kvarco (fundamenta), mineralo, el kiu konsistas ankaŭ la kvarcito;
40. laterito, rezidua rokaĵo, riĉa je fer-kaj alumini-mineraloj; latero, geometria termino;
41. lazurito, blua silikato; lazuro (oficiala), blua koloro, ankaŭ tiu de la firmamento;
42. lignito, kaŭstobiolita sedimento; ligno (fundamenta); ekzistas ankaŭ lignino, sen timi interpreton pri ineco...;
43. limonito, fererco konsistanta el pluraj mineraloj oksidaj-hidroksidaj; limono, frukto. Ambaŭ vortoj etimologie koheras (*el: limen* = golfo, *lemon* = marĉa herbejo, perse: *limun* = citrono). Homonime ne ĝenas eĉ limon-ado;
44. magnetito, la plej ferriĉa mineralo; magneto (fundamenta), magneti (tr) signifas laŭ PIV: komuniki al ferpeco la altirecon de magneto. Konsekvence, la adjektivo magnetita, homonima kun magnet-ita, povus liveri konfuzon, kiun Eo tamen ne timas;
45. magnezito, la minerala magnezikarbonato; magnezo (kaloĉaja) estas magnezio-oksido, sed laŭ *Portmann-Rogers* (1993) ankaŭ la koncerna karbonato; tio ĉi estas evidente malprava;
46. metrito, inflamo de utero, estas en PIV ekvivalento de uterito, sed en *Hradil* (1979) ĝi mankas; metro (fundamenta) ne bezonas komenton;
47. metropolitio; metropolo (zamenhofa);
48. perlito havas, krom la PIVa difino pri ferspeco, ankoraŭ la petrologian-teknologian: vulkanviro kun globeta

teksturo; ĝi estas utiligita precipe prilaborita ekspanse;

49. petito, litertipo, homonimas kun petito;

50. poplite (*la: poples*), parto de gambo; poplo (*Populus*), arbo; tiu ĉi komunuza fundamentaĵo devus ricevi botanikan nomon: popolo. Tiel, el la vidpunkto nomenklatura, malaperus la homonima popl-ito;

51. precipiti kaj la fundamenta adverbo: precipe, ne bezonas komenton, same kiel

52. remito, la medicina termino; remi, la fundamenta verbo kaj Remo, la legenda kunfondinto de Romo;

53. reniti, la medicina termino; reno, la fundamentaĵo;

54. siderito estas en PIV kurioze difinita; temas pri mineralo, feroza karbonato; sidera = astronomia tempo rilata al steloj;

55. sienito estas plutona rokaĵo, analoga al granito, sed preskaŭ sen kvarco; sieno = pigmento nomita laŭ Sieno, la itala urbo;

56. sofito, arkitektura elemento; sofo (fundamenta): meblo;

57. spondilito, vertebra malsano; spondilo (*Spondylus*), fosilia lambranĥulo = bivalvulo (netrovebla en PIV);

58. suberito, korkeca materialo; suberato, salo de gras-acido; subero, korka histo;

59. trakito homonimas kun trak-ito, sed tute superflue, ĉar la fonetike pli bona formo estas: trahito;

60. trilobito. PIV referencas al lobo (oficialaĵo) kaj proponas pli esperantan formon „trilobulo“. Nu, el vidpunkto

nomenklatura, tiu ĉi formo estus tre diskutinda. Mi ne konas lingvon, kiu aplikus por la paleozoika artikulo alian formon ol trilobito. Cetere, eĉ la pasiva sufikso taŭgas. Eo gramatike: lobita trioble;

61. vomito (*la: vomitus* = vomado). La PIVa difino: la flava febro, estas en la plej bona okazo nesufiĉe ampleksa, ĉar la medicinistoj distingas diversajn vomadojn; vom-ita (fundamentaĵo) homonimas kun vomit-a kaj sendube povus generi konfuzon en medicina teksto;

Fine, en PIVS ni trovis la vorton stilito, sed tiu apenaŭ interesus natursciencan terminologon aŭ nomenklaturiston.

Do, ni konstatas, ke en la ĝisnuna leksiko de Eo ekzistas 61 ekzemploj interpreteblaj homonime kaj tamen ne inspirintaj al misformado. Tiu ĉi cirkonstanco povus fariĝi bona garantio precipe por venonta akceptado de ĝustaj formoj kun la radikfina -IT-.



Ekz., la radikfina -IT- estas tre tipa

por mineralnomoj, da kiuj ekzistas pli ol 10 000. El ili, onomastikan (propranoman) devenon ni konstatis proksimume 56% (*Kavka*, 1981), ĉar mineralon plej ofte oni „baptas“ omaĝe al persono iel meritoplena (laŭ takso de la nomelpensinto). Jen kelko da ekzemploj: abihito (laŭ la germana geologo) buĥvaldito (laŭ la germana metalurgo) deĥenito (laŭ la germana esploristo) friedrihito (laŭ la aŭstria geologo) riĥterito, ŝafnerito, suĥardtito (laŭ la germanaj mineralogoj) ungemahito (laŭ la belga kristalografo) beteĥtinito, ĉuĥrovito (laŭ la rusaj mineralogoj).

El la miloj da mineralnomoj ni elektis intence tiujn, en kiuj troviĝas la fonemo -Ĥ-, ĉar ĝuste ĝi estas ne sole en PIV, sed ankaŭ en aliaj modernaj esperantajoj malprave modifata per -K- (*Kavka*, 1980, 1987). El onomastika vidpunkto, tiu ĉi procedo estas simplaj perforto kaj diskriminacio de la fonetiko tiel fontlingva, kiel esperantlingva.

Mineraloj estas nomitaj ankaŭ laŭ siaj trovlokoj, ekz.:

fiĥtelito (laŭ la germana montaro *Fichtelgebirge*)
 kohĥenito (laŭ la aŭstria *Kochental*)
 lengenbahito (laŭ la svisa urbo)
 puĥerito (laŭ la saksa minejo *Pucher*)
 vitihenito (laŭ la germana loko *Wittichen*).

Okaze de rokaĵ-nomoj, trovlokoj rolas pli ofte ol personnomoj:

alsbahito (laŭ la trovloko en *Odenwald*)
 buĥonito (laŭ tiu ĉe Fuldo)
 durbahito (laŭ tiu en *Schwarzwald*).

La germanaj ekzemploj estas prenitaj el *Kavka* (1994).

Evidente, danĝero de konfuzo pro homonimeco estas nula okaze de onomastikaĵoj, ekz. glaŭberit-o kaj glaŭber-ito, aragonit-o kaj aragon-ito, johanit-o kaj johan-ito k.t.p.

Pli konsiderinda konfuzo povas generiĝi pri mineral-nomoj derivitaj de hemi-elementoj: antimonito, cerito, fluorito, fosforito, ĥromito, kuprito, molibdenito, stanito, telurito, volframito, zinkito. Ja ilin oni povas senpere verbigi: kupr-ita ne estas kuprit-a. Memkomprene, ekzistas pli „danĝeraj“ homonim-okazoj kaj tamen oni devas strikte rifuzi pro tio ajnan misformon de kodigitaj nomenklaturaĵoj: aluminito, cianito, cilindrito, daliito, gladito, haĥito, halito, hastito, humito, ilito, jenito, kalderito, kanito, kaolinito, karlinito, kasito, kermesito, langito, leonito, liberito, majorito, marito, melito, melonito, morito, neptunito, parkerito, pinĥito, prenit-o, purpurito, raspito, rosito, spurito, tremolito, tronito, tundrito, tunelito, uleksito, uvito, venkito, vinĥito. (Aliflanke, la mineralo vulkanito intencie koincidas kun „vulkanito“ = vulkanrokaĵo, sed geologoj-esperantistoj ĉi-okaze preferas vulkanaĵon; analoge estas uzata plutonaĵo, kvankam „plutonito“ ne havas mineralan homonimon.) Por konatigi kun esperantigitaj mineralnomoj, plej bone taŭgas la verko de *Høeg* (1988).

Eblas elnombri ankaŭ vicon da ekzemploj rokaĵ-nomaj, kies radikfina -IT- memorigus pri homonimeco: alĝito,

arkito, bacilito, bojito, bustito, domito, dunito, durito, eklogito, fenito, gejserito, granulito, karito, kaskadito, klarito, kokito, kongresito, korsito, kovito, lanito, latito, leptito, malignito, meteorito, milonito, murito, navito, oceanito, palito, pelito, polenito (kp. la 2-an ĉapitron de niaj Homonimoj: -EN- kaj -IN-), porcelanito, regolito (kp. la 1-an ĉapitron de niaj Homonimoj: -OL- kaj -UL-), ringito, rodito, runito, silicito, taksito, tarantulito, turito, variolito, venito, vitrito:

Ne sole mineral- kaj rokaĵ-nomoj entenas la radikfinan -IT-. Pli supre, esplorante la oficialajn kaj neoficialajn terminojn, ni renkontiĝis kun teknologiaj produktoj: dinamito, ebonito, ferito, kordito, termito; kun medicin-sciencaj nomoj: glosito, kolito, metrito, poplito, remito, reniti, spondilito; kun biologiaj nomoj: balzamito, budito, moskito, trilobito. Oni povus elnombri centojn da nomoj aŭ terminoj.

Resume: La radikfina -IT- estas leksike tiom ofta aĉaĵo, ke Esperanto havas nek motivon, nek ŝancon interveni ĉi-okaze per ajna misformado, por forigi eventualajn homonimecojn.

Fontoj

Esperanto and English Dictionary (1969). J. C. Wells. - *The English Universities Press LTD. London.*

Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto (1970). - Sennacieca Asocio Tutmonda. *Paris.*

Esperanta Medicina Terminaro (1979). J. Hradil. - *Universala Medicina Espe-*

ranto-Asocio.

La fonemo Ĥ kaj ties transformoj en la internacia scienca leksikologio. (1980). J. Kavka. - Kolekto de la seminarioj referaĵoj APLIKO DE ESPERANTO EN SCIENCO KAJ TEĤNIKO (93-100). *Ústí nad Labem.*

Onomastiko en fakterminoj konsidere ilian esperantigon (1981). J. Kavka. - Kolekto de la referaĵoj de konferenco APLIKO DE ESPERANTO EN SCIENCO KAJ TEĤNIKO (vol. 1, 6-14). *Žilina.*

Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto. Suplemento (1987). - Sennacieca Asocio Tutmonda. *Paris.*

Mineralnavn (norsk-esperanto-engelsk) (1988). T.A.Høeg. - *Universitetsbiblioteket i Oslo, Skrifter: 15.*

Inversa Vortaro de Esperanto (1989). B. Pabst. - Esperanto-Centro, Paderborno.

Kemia kaj Scienc-teknika Vortaro (1993). D. Portmann-D.Rogers, *Naperville.*

Asimilado de germanaj nomoj en Esperanton (precipe por la bezono naturhistoria) (1994). J. Kavka. - Prelego okaze de la 43-a kultura semajnfino. Sarlanda Esperanto-Ligo, Homburgo.

Ĥ en mineralnomoj (1997). J. Kavka. - *Scienca Revuo, 1, 44 - 51. Eschwege*



Teodoro Aleksandro Dolejš

NE PERDU LA ESPERON!

Ne perdu, fratoj, la esperon
de la alveno de pli bonaj
por ĉiuj tempoj kaj progreso
de la ideoj fruktodonaj!

La semoj de l' ideoj ĝermas
en preparitaj la hommensoj;
la pluvo de l' sufero ilin
kreskigas sur la kamp' de l' pensoj.

La suno, vento ilin nutras
dum la printempo kaj somero;
kaj venos tempo de rikolto,
kaj fruktojn donos la espero.

Kulturu, do, la idealojn,
se eĉ la tempo ne favoras;
venkhoru venos certe, se vi
konstante kun esper' laboras.

Teodoro Aleksandro Dolejš, ĉeĥa pensulo, enmigris en Brazilon en sia juneco kaj verkis en la portugala lingvo rimarkindajn artikolojn aperintaj en *Reformador* kaj *Jornal Espírita* pri la senmorteco de la animo. Kiel esperantisto li skribis ankaŭ versojn. Li mortis proksimume en 1934.

La supraj linioj estas prenitaj el la libro „Voĉoj de poetoj el la spirita mondo“. Ĝi enhavas klarigan artikolon pri spiritismo kaj entute 80 poemojn, verkĵitajn fare de spiritoj de konataj samideanoj, skribitaj per medio de F. V. Lorenz. Pluaj 18 poemoj estis skribitaj

portugallingve kaj Lorenz esperantigis ilin. Pri Dolejš diras nenion Enciklopedio de E., eĉ Historio de E-movado en Ĉeĥoslovakio. Grabowski verkis 18 poemojn, João da Cruz e Souza 11, K. /?/ 3, Zamenhof 8, Schulhof 24, Dolejš 16. Eldonis Livraria Editora de Federação E. Brasileira, Rio de Janeiro, 1944.

Adolf Staňura



Provu traduki

Ĉifoje ni ricevis nur du solvojn de nia frazoj

J. Wiatrová

- 1) Homo denove maltrafis / fiaskis.
- 2) Eĉ hundo ne prenis de li pan-kruston.
- 3) Li aŭdas eĉ herbon kreski.

Radek Wolkowinskij:

- 1) Denove homo malsukcesis.
- 2) De li eĉ hundo la pankruston ne formangus.
- 3) Li aŭdas eĉ la herbon kreski.

Poŝ venonte ni provu traduki en la ĉeĥan kelkajn proverbojn de Zamenhof:

- 1) Tien okuloj iras, kion la koro deziras.
- 2) Ĝi glitas de li kiel pizo de muro.
- 3) Alian ne mallaŭdu, vin mem ne aplaŭdu.

Donacoj por asocio

Ivana Drbohlavová, Turnov	500,-
Josef Pozdniček, Sedmihorky	200,-
Antonín Bombionka, Ostrava-Poruba	200,-
Jaroslav Mařík, Praha	100,-
Jan Janda, Kolín	50,-
Ing. Zdeněk Pluhař, Praha	300,-
Marie Bartovská, Frydek-Místek	3.537,-
Ludmila Šatánková, Střítež n. L.	100,-
Adolf Staňura, Havířov	1.000,-
pí Kusová, Třinec	140,-
Zdena Folková, Písek	1.720,-
MUDr. Josef Hradil, Mnich.Hradiště	1.380,-
Milan Neuwirth, Ostrava-Poruba	710,-
Josef Jílek	520,-
Marie Moučková, Ústí n.L.	1.070,-
Jiří Patera, Praha	1.380,-
Václav Stibůrek, Benešov	1.380,-
Ing. Miloš Bloudek, Karlovy Vary	1.380,-
Radek a Helena Maudrovi, Praha	1.890,-
Jaroslav Pokorný, Baltice	380,-
Renata Mauserová	720,-
Ing. Margit Turková, Obořiště	1.720,-

Pluraj el la donancintoj rezignis pri sia rekompenco de helpanto en UK Praho 1996.

La Esperantista Klubo en Praha dankas al ĉiuj kluboj kaj unuopaj esperantistoj, kiuj esprimis sian konsenton okaze de la forpaso de la honora prezidanto de Esperantista Klubo en Praha s-ano Jaroslav Mařík.

Jiří Patera

Přehled hospodaření ČES

v roce 1996

(Schváleno dozorčí radou dne 9.8.1997)

Příjmy

Členské příspěvky	99.307,- Kč
Tržby (prodej materiálu)	54.854,- Kč
Pisemné kurzy	1.130,- Kč
Dotace ministerstva kultury ¹	50.000,- Kč
Členské příspěvky UEA	5.155,- Kč
Předplatné časopisů	4.449,- Kč
Přijaté úroky	4.451,- Kč
Dary	7.954,- Kč
Dividendy	10.832,- Kč
Mimořádné akce ²	286.200,- Kč
Celkem příjmy	524.332,- Kč

Výdaje

Ostatní osobní výdaje	46.688,- Kč
Cestovné	40.553,- Kč
Poštovné, telefony	34.555,- Kč
Vydavatelská činnost	71.655,- Kč
Prodej zboží	66.731,- Kč
Spotřeba režij. materiálu	10.686,- Kč
Ostatní nevýrobní služby	10.885,- Kč
Daně, poplatky	5.268,- Kč
Ostatní výdaje	6.499,- Kč
Mimořádné akce ³	223.922,- Kč
Celkem výdaje	517.442,- Kč

Hospodářský výsledek - úspora
6.890,- Kč⁴

Vysvětlivky:

- 1) dotace na akci „Moravský folklor světu“ v rámci předkongresu v Brně
- 2) UK Praha, 8. sjezd ČES Havířov
- 3) Předkongres Brno, UK Praha, 8. sjezd ČES
- 4) Hospodaření za UK 1996 bude vyúčtováno v roce 1997

Jiří Patera

Odesílatel:

Český esperantský svaz
ESPERANTO, p. s. 1069
111 21 Praha 1
☆ **STARTO** ☆

Periodikum Českého esperantského svazu (28. ročník)
Redaktor: Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno
Členská evidence a změny adres: Květa Hubnová, ČES Praha

Presorgano de Ĉeĥa Esperanto-Asocio (28-a jarkolekto)
Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj perantoj aŭ rekte ĉe nia Asocio
Abonprezo: 15 gld
Redaktoro: Miroslav Malovec, Bosonožská 15, 625 00 Brno,
Ĉeĥio

Podávání novinových zásilek povoleno
Českou poštou, s.p., Odštěpným závodem Severní Morava,
č.j. 1533/95-P/1 ze dne 3. 8. 1995

NOVINOVÁ ZÁSILKA

**Poštovné hrazeno v hotovosti
u pošty 746 01 Opava 1**